

TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

Volumo 58, Numero 04, aprilo 2023

Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio
Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else

Estrarkunveno de EFNSK

Dmitry Lushnikov, direktoro de EFNSK

La 2-an de aprilo ni havis estrarkunsidon. Jen kelkaj punktoj pri kiuj ni diskutis:

Ewa, la interna projektisto prezentis plurajn konceptojn por la renovigo de Esperanto-domo kaj la fabriko.

Tri diversaj arkitektaj firmaoj prezentis siajn kostproponojn.

Ni akceptis la kostproponon por la ĝeneralaj elektraĵ laboroj.

La federacio diskutis anstataŭigi la liton por la gastĉambro.

La venonta estrarkunsido okazos dimanĉon la 7-an de majo je la 9a horo matene per zoom. Ĉiuj estas bonvenaj partopreni kaj doni al ni ideojn por disvastigi Esperanton.

Marcel Leereveld

Nicole Else, sekretario de EFNSK

Marcel Leereveld naskiĝis en 1917 en Nederlando kaj forpasis la 21an de marto 2023 je la aĝo de 105. Li lernis Esperanton en 1933 kaj renkontis persone la filinon de Zamenhof. Li translokiĝis al Aŭstralio en 1952 kaj estis instruisto pri lingvoj. Dum la tuta vivo li estis tre aktiva Esperantisto. Li estis dum iom da tempo la prezidanto de Aŭstralia Esperanto-asocio, li instruis Esperanton oficiale en lernejo, li instruis Esperanto-gramatikon dum somerkursaroj, organizis somerkursarojn, verkis multajn artikolojn, ktp.



Marcel 90 jara en 2007 dum la festo

Mi plurfoje renkontis Marcel dum somerkursaroj. Kiam li fariĝis 90 jara, okazis surprizfesto. Marcel pensis, ke li festos sian naskiĝtagon kun familianoj kaj eble kelkaj Melburnaj Esperantistoj. Nu ĝi estis grandega festo. Mi veturis al Melburno por ĉeesti ĝin. Ankaŭ Margaret Chaldecott speciale veturis al Melburno por tiu evento. Pluraj Esperantistoj el Adelajdo veturis al Melburno, eĉ unu el Perth. Mi havas tre agrablajn rememorojn pri tiu festo. La etoso de tiu festo estis tiom bona. Mi pensis, ke estus bone povi festi ankaŭ la centan naskiĝtagon de Marcel, sed tiam mi preskaŭ certis, ke Marcel estante viro ne povus atingi 100 jarojn, sed mi eraris, li finfine atingis ne nur 100 jarojn, sed eĉ 105!

Poste mi ankaŭ almenaŭ 2 foje tranoktis en la hejmo de Marcel kaj vidis sur la muroj la multajn pentraĵojn faritajn de Alida, la edzino de Marcel.

En 2006 ekestis problemoj ene de AEA pro la tiama prezidanto Igor. Mi tiam multe komunikis kun Marcel kaj konstatis, ke Marcel ege bone aŭskultas kaj provas trovi inteligentajn solvojn. Kiam mi parolis kun aliaj personoj kiuj ne mem spertis la problemojn preskaŭ ĉiuj ne estis interesataj. "ne mia problemo" ili diris. "Mi volas resti neŭtrala" ili diris. Sed Marcel tute ne estis tia. Jen interesaj komentoj de Marcel skribitaj en 2006:

"Karaj ĉiuj! Estas hontinda ke Prezidanto traktas membrojn Nicole kaj Heather (kaj aliajn) tiom cinike kaj malhelpeme. Estas eĉ pli hontinda, ke ekzistas homoj en A.E.A. kiuj ne hontas pri tio. Estas bedaŭrinda, ke la resto hontas sed faras nenion. Laŭ la proverba "La plej granda malamiko de organizaĵo ne estas tiuj, kiuj volas uzi ĝin por si mem, sed tiuj, la granda amaso, kiuj apatie kaj sitrompe faras nenion kontraŭ la misuzoj".

Jen alia mesaĝo de Marcel de 2006 "Mi persone protestas kontraŭ la ago de S.ro Gaskell, eĉ se ĝi estus laŭ regula, kaj mi postulas ke la Estraro klarigu ke ĝi ne estas oficiala nek valida, kaj petas pardonon al Nicole pro la maljusta traktado. Mi samtempe petas ĉiujn demokratemajn membrojn de A.E.A. agi same kaj protesti al la Estraro. Mi certas, ke via manko de protesto peze kuŝos sur via konscienco dum la resto de via vivo."

Poste en la mesaĝo Marcel bone argumentis kial la decido de Anthony Gaskell ne estas valida. Mi ne bone memoras, sed mi pensas, ke preskaŭ neniu membro protestis pro la diktatoreca konduto de kelkaj estraranoj.

Do Marcel tute ne hezitis reagi al malveroj, maljustecoj, maldemokrataj decidoj. Ne ĉiuj ŝatis tion. Li certe neniam forgesis, ke dum la somerkursaro en Hobarto la estraro fizike malhelpis lin eniri la salonon kie okazas la jarkunveno de AEA.

En malfacilaj tempoj oni povas konstati kiuj estas niaj veraj amikoj.



Marcel, Alida kaj mi en 2009

La biblioteka taskego daŭras

Jonathan Cooper, prezidanto de EFNSK

Merkredon, la 26an de majo, mi finis la unuan paŝon de la procezo katalogi la Federacian bibliotekon. Mi kreis datumbazan rikordon de ĉiu libro kaj periodaĵo en la kolekto. (Laŭ mia kalkulo, estas 1751 titoloj kaj 2667 eroj. Tamen mi eble eltrovos, ke iuj eroj estis nombritaj dufoje.) Iuj libroj havas papereton sur la dorso de la antaŭa kovrilo, kiu deklaras, ke la libro estas parto de la arkivo, kaj tial oni ne rajtas forpreni ilin de Esperanto-Domo. (Tiujn mi jam metis en la arkiv-ĉambron en markitajn skatolojn.) Krome, mi katalogis kelkajn aliajn tre malnovajn librojn, kiuj miaopinie ankaŭ devus esti metataj en la arkivon.

La sekvaj taskoj de la katalog-procezo estas:

2. Krei kodsistemon

3. Meti unikan kodon sur la spinon de ĉiu libro (kaj ene stampi ĉiun libron: “Esperanto NSW Biblioteko” se ne jam tiel stampite)

4. Ordigi la librojn en la ŝrankoj

5. Krei enretan sistemon por ebligi la membrojn serĉi la bibliotekon kaj pruntepreni erojn

Por kodsistemo, mi konsideris uzi la Dekuman Klasifikon laŭ Dewey (DDK), sed laŭ mi tio ne vere taŭgus, ĉar ĝi estas multe tro specifa kaj ne konsideras specialajn bezonojn de Esperanto-biblioteko. Do, mi ellaboris mian propran kodsistemon, bazitan sur la efektiva enhavo de nia kolekto.

Resume, la kolekto dividiĝus en 3 sekciojn, kiuj estas:

1. Ĝeneralaj aferoj (ekz-e filozofio, biologio, geografio,...)

2. Pri-Esperanta (ekz-e vortaroj, lernlibroj, gramatiko,...), kaj

3. Literatura (ekz-e romanoj, poezio, teatrekstoj,...)

La “Ĝenerala” sekcio estas *malstrikte* bazita sur DDK, sed uzas kaj numerojn kaj literojn, ekz-e: “20REL” = Religio. Mia sistemo ankaŭ uzas nur 2 ciferojn (DDK uzas 3 antaŭ la dekuma punkto, kaj plurajn poste). La avantaĝo de mia “numer-litera” sistemo estas, ke oni ne devas ĉiam memori kion signifas ĉiu numero. La kodoj por la aliaj du sekcioj komenciĝos per “E-” (Pri-Esperanta) aŭ “L-” (Literatura).

Iuj verkoj havas sufiksojn en siaj kodoj, kiuj povos esti uzataj kune, ekz-e:

Tradukitaj verkoj: “-t”. Verkoj en la angla: “-a”. Verkoj por infanoj: “-i”

Jen iuj ekzemploj:

Jaap Romijn (verkinto) kaj Kees Scherer (fotinto), <i>La mondo en koloroj: Nederlando</i>	91GEO-Ned Rom
Nicole Else, <i>Mummy, why can't we all speak the same language?</i>	80LIN-ia Els
L Frank Baum (tradukita de Donald Broadribb), <i>Doroteo kaj la sorĉisto en Oz</i>	L-10ROM-ti Bau
G Gladstone Solomon, <i>Esperanto por infanoj</i>	E-33LE2-i Sol

Se la kodoj estus neunikaj, nombroj estos aldonataj al la dua linio.

Mi nuntempe petas la aliajn estraranojn komenti kaj sugesti, do la fina sistemo eble estos iom malsama ol mia priskribo.



Provizora ĥaoso en la biblioteko dum mi ordigas la librojn en sekcioj



La titolpaĝo de tre malnova libro en la kolekto (estonta en la arkivo): *Ifigenio en Taŭrido* de Goethe, tradukita de D-ro L L Zamenhof, eldonita en 1908!



EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 09:00 ĝis 11:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 manly@esperanto.org.au

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 newcastle@esperanto.org.au

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:

Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
(*Sonigu elektran zumilon ĉe la strato*)
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: nsw@esperanto.org.au

Prezidanto:	Jonathan Cooper
Vic-prezidanto:	Andrew Spanenberg
Sekretario:	Nicole Else
Kasisto:	Alan Turvey
Estrarano:	Chris Betcher, Adam Levy, Dmitry Luŝnikov

